

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

ACADÈMIA COTS

ARCHS. 10

LICEU DALMAU

VALÈNCIA. 245

La Federació Catalana d'Esperantistes, d'acord amb la direcció dels esmentats centres instructius, té en preparació uns cursos d'Esperanto, la duració dels quals serà de tres mesos.

Properament, per mitjà de la premsa diària, s'anunciarà el dia d'obertura, hores, professors, etc.

D'aquesta manera pensem atendre els precs de molts amics que ens han demanat una pila de vegades facilitats per tal de conèixer l'Esperanto.

Als nostres lectors i abonats pertoca bona part de les tasques de propaganda per tal que els cursos en organització tinguin un èxit ben falaguer.

“KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj.
 Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245 - BARCELONA

FEDERACIAJ GRUPOJ

Esperantista Klubo Palma
 Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca
Empordana Ebenajo
 (Girona) Armentera
Esperanta Nesto
 (Joventut Catòlica) Ripollet
Frateco
 Placo Pi i Margall, 14. Vendrell
Ĝerona Espero
 (Creu Roja) Girona
Lumon
 St. Antoni, 64. Terrassa
Studenta Juneco
 (Seminari) Girona
Aplec
 Mendizàbal, 3. Sabadell
Bela Espero
 Carretera de Vich, 41. Manresa
Esperanta Idealo
 Mossèn Verdàgner Sta. Coloma Farnés
Esperantista Amikeco
 Plaça Bernardí, 10. Manlleu
Esperanta Burgono
 (Centre Democràtic) Rubí
Internacia Frateco
 (Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet
Paco kaj Amo (Soc.)
 Planeta, 16, pral. Barcelona
Barcelona Stelo
 Marquès Duero, 101. Barcelona
Barcelona Esperanto-Societo
 Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona
Esperantista Grupo «Solleric» Soller

Artés: Sro. Manuel Monrós
Armentera: Empordana Ebenajo
Banyoles: Sro. Joan Aulina
Figueres: Sro. Carles Varela
Girona: Sro. Josep M-a Dalmau
La Garriga: Sro. Joan Blancafort
Mahó: Sro. S. Ortega Barceló
Manlleu: Sro. Marian Vilardell
Manresa: Sro. Josep Albagés
Mataró: Sro. Francesc Torres
Molins de Rei: Sro. A. Canals
Monistrol de Montserrat: Sro. F. Orobitg, Pastro
Palafrugell: Sro. Francesc Sagrera
Palau de Montgut: Fino. Lluïsa Bargés
Palma de Mallorca: Sro. Narcís Bofill
Reus: Sro. Enric Aguadé
Ripollet: Sro. Josep Planas, Pastro
Rubi: Sro. Joan Ratés
Sabadell: Sro. J. Bracons
St. Adrià del Besòs: Sro. S. Arnella
St. Martí Sapresa: Sro. Joan Rieradevall
Sta. Coloma de Farnés: Sro. Pere Costa
Sta. Coloma de Gramanet: Internacia Frateco
Sallent: Sro. Lluís Solé
Sóller: Sro. M. Arbona
St. Felit de Pallarols: Sro. J. Collelldevall
Terrassa: Sro. Ramon Marsà
Teyà: Dro. Jacint Barrera
Vendrell: Fino. Maria Julivert
Vich: Sro. Pere Farrés
Vidreres: Sro. Josep Macià
Vilanova i Geltrú: Sro. Jaume Fort
Vilassar de Mar: Sro. Pere Domènech

LOKAJ DELEGITOJ

Ager: Fino. Maria Plans
Almúnia de Castellví: Sro. Pere Esvertit
Amel·la de Merola: Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRÉ

Redaktoroj: Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

Lingvoegaleco

Frederik van Eedem estas granda aŭtoro el Nederlando. Lia verko «La malgranda Johano» estas unu el la plej bonaj el la tutmonda literaturo. Mi tion scias dank' al Esperanto. La fama germana eldonisto Rudolf Mosse, el Berlino, komencis Bibliotekon Tutmondan per publikigo de «Mateo Falkone kaj aliaj rakontoj» de la franca Mérimée kaj la nomita poemo de holanda aŭtoro. — Jen germana eldonisto kiu tutmondigas holandan verkon per Esperanto kaj pliriĉigas la esperantan literaturon per tradukoj el franca lingvo.

Apel-les Mestres kaj aliaj katalunlingvaj aŭtoroj havas tradukojn en rusa kaj aliaj lingvoj dank' al interlingvo Esperanto. La ĉeklingvano Hromada kaj la flandralingvano Frans Schoofs kunsidas lingve samfacile kaj samdigne kiel angla aŭ franclingvanoj. Katalunlingvanoj estas en la Lingva Komitato samrajte kiel paroluloj de itala aŭ germana lingvoj: Frateco, egalo kaj libero estas bela rezultigo de Esperanto inter la malsamnacilingvanoj.

Nia eminenta ĵurnalisto Rovira i Virgili antaŭ kelka tempo publike diris ke li fariĝas esperantisto. Li komprenas pli kaj pli ke estas bezonata lingva formo, kiu, sen kontraŭjuĝo por la naciaj aŭ regionaj varioj, taŭgu por tuthomara interkompreno. Oftege oni aŭdas la diron ke decas esprimi sin per maniero ke plej granda nombro da homoj komprenu. Laŭ tiu principo oni logike alvenas al la konkludo, kiun prezentas internacia lingvo.

Neniu el la hodiaŭaj lingvoj, grandaj aŭ malgrandaj, gloraj aŭ humilaj, antikvaj aŭ novaj, belaj aŭ malbelaj posedas la kondiĉon de plena universalso. Kelkaj havas pli vastan areon ol aliaj. Kelkaj estas katenitaj en la propraj limoj. Aliaj forsaltas tiujn limojn kaj estas konataj de homoj malsamnas-

kolingvaj. Sed ĉiam estos miloj kaj milionoj da homoj, kiuj, antaŭ teksto skribita en privata lingvo, kaj eĉ en tri aŭ kvar lingvoj, restos malkapablaj kompreni.

Se vere estas dezirinde kaj eĉ necese ke difinita teksto estu komprenata de ĉiu homo, ne estas logike ke oni haltu ĉe la eklektika solvo uzi lingvojn de pli vasta teritoria areo. Pli dece estas alpaŝi la solvon kompletan, perfektan, definitivan, kiu konsistas en la alpreno de helpa lingvo sama por ĉiuj popoloj apud la respektiva gepatra lingvo.

Tiu devus esti la tezo de ĉiuj kiuj prezentigas kiel universalistoj pri lingvo. Tiuj kiuj celas, por solvo de la problemo, la alprenon de iu el la tri aŭ kvar lingvoj kiuj hodiaŭ havas pli grandan disvastiĝon, devus akordiĝi por alveno al la unika solvo, kiu ne povas esti en lingvo nacia. La defendo de ne plena solvo povus ŝajni defendo de lingva privilegio. Oni povus kredi ke ties defendantoj volas ne nur faciligi lingvajn rilatojn inter popoloj, sed favori kelkajn lingvojn malprofite de aliaj.

Decas ke la lingva universalismo estu malavara, tio estas, ke ĝi ne speciale profitu iun nacian lingvon. Se oni falas laŭ tiu falgilo nepre venos konkurado aŭ rivalado inter tiuj lingvoj kiuj okupas la unuajn vicojn en la lingvaraj statistikoj. Kontraŭe, lingvo vere universala kiu utilu ne por privataj aferoj de la popoloj, sed simple por komunikado inter ĉiuj malsamlingvaj, prezentas neniun el tiuj danĝeroj.

La asertoj de nia klarvida amiko tute harmonias kun la oficiala «Deklaracio pri Esperantismo»: «La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu *ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn*, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas».

Ni neniam forgesu tiun majstran gvidon, kiu montras la rektan kaj difinitan vojon.

Esperanto estas lingva progreso kaj lingva regeneracio, lingva egaligo de la homaro. Ĉefe pro kaŭzoj, cirkonstancoj kaj akcidentoj politikaj, en la mondo estas lingvoj disvastigitaj kaj privilegiaj; kaj lingvoj persekutitaj kaj sklavaj. La progreso de la Juro estigis egalecon, justecon laŭ leĝoj inter ĉiuj homoj en la civilizita mondo. La progreso de la Lingvaĵo celas egalecon, justecon super la lingvaro de la popoloj. La lingvara justeco estas la unua efektiva paŝo en vojo al homaranismo. Ni ne forgesu ke nia majstro juĝis ĉefe grava la internan ideon de Esperanto. Li konsciis ke estus malgranda progreso la materiala eblo interkompreniĝi sen morala progreso. Nia himno ja ne diras en la *mondon venis nova lingvo*, sed, *en la mondon venis nova sento*.

DELF DALMAU

Adiaŭo de Patrino

de J. Wittlin

— Ordigu al mi, fileto, la kusenon kaj donu vian manon varman —
 Kiel bone estas nun — kiel silente — kiel silente estas nun en la dormejo —
 Neniu muŝo zumas super mia kapo — ekstere estas bele —
 Malantaŭ la muro oni ludas Mozarton — la najbaroj evidente estas muzi-
 [kemaj]! —

Eĉ la febro ne martel-frapas nun en la kranion —

— Ĉu ne vere, filo: — mi ĵuna? ! — Vere, ke mi estas ĵuna? ! —

Antaŭ jaroj — en tiu ĉi lito, en kiu mi agonias tiel ĵune,
 mi naskis vin. — Ho! kia vi estis belega infano! —
 — Kiel terure estas al patrino morti, kiam ŝi tian okazintaĵon ekmemoras,
 Kiel terure! —

Kaj estas nun printempo! — Ĉu vi manĝis jam, filo, ĉerizojn?
 — Atentu: ne manĝu verdajn! Kaj ne trinku akvon, kiam vi tre varmigiĝis;
 vi estas ja saĝa infano kaj la pulmojn volas havi sanajn?

Malbona patrino, malbona! — Tiel frue forlasas la filon;
 kaj havas lin nur unu, kaj dorlotis lin tiel zorgeme!
 — Kaj ne forgesu dum vintro — porti lanajn ŝtrumpojn! . . .
 — Ha! ! — ili ĉiuj estas disŝiritaj! — Kiu al vi poste ilin flikos? ! —
 La onklino! — Kaj eble — kaj eble — vi havos bonan duonpatrinon? !
 — Donu al mi akvon — jam estas pli bone —
 — La koro nur — (jam estas pli bone) — iomete ekstremis pro maltrankvilo —
 — Pri ĉio! — Ĉu vi aŭdas? — pri ĉio kaj ĉiam obeu paĉjon!

Mi tiel forte vin amis ke mi tremas pro la severa sorto,
 ke eble en la alia mondo — mi jam pri vi ne scios?
 Kiu scias! ! — Eble la animo ne vivas? Kaj kune kun la korpo finiĝas ĝi en
 [la tombo?

Kiu scias ĉu mortinta homo — ankoraŭ tiun teron memoras? !
 Kaj se li forgesos? — kaj eble li forgesos? !

Tial mi malĝojas,

eĉ se mi T I E estus feliĉa — kaj per nenia zorgo tuŝita! —
 Ĉu mi povus vin forgesi, vin, kiu estis mia enhavo?
 Ĉu mi povus iam ne scii kion deziras via rigardo,
 ne esti apud vi — almenaŭ en spirito — kiam timego dum dormo
 kuŝiĝos sur vian bruston kaj vi ekkrios ŝirita de doloro! !
 Ĉu mi povus vin forlasi kaj ne karesi per mano virina? ! —
 Kaj poste kiam vi pli aĝiĝos kaj irados al lernejo, —

Ĉu mi eltenus ne stari antaŭ la pordego, ne atendi vin dum tagmezo?
 Kaj eĉ en spirito ne esti apud vi kiel anĝeloj-gardantoj, —
 ne legi viajn bonajn atestojn, ne laŭdi kiam vi bonege prosperas?
 Ne ŝirmi vin almenaŭ en spirito — antaŭ la pugnoj de viaj kamaradoj,
 ne vidi viajn larmojn, kiam vanaj estos viaj penoj lernejoj,
 ne aŭdi: Panjo! — kiam vi ĝemos el sub la patraj pun-batoj,
 ne demandi kiam vi melankoliĝos: Kio vin doloras, mia kara?
 ne ĝoji, kiam bona — vin foje vizitos kolego?!
 Ĉu mi povus ĉi ĉion ne vidi, ne aŭdi?!

Ho Dio! Ne avaru al mi hodiaŭ la solan konsolon:
 Donu certecon al la koro — ĝi kreu, ĝi iluziĝu per la eterneco de l' ani-
 [mo]

Akceptu favore al la juĝoj ĉiujn miajn pezajn pekojn —
 kaj se eĉ mi devus iri en inferon — : mi rigardu de tie sur la mondon! —
 — Morgaŭ mia unika filo vekigĝos en sia liteto —
 la patro - ie for de la domo, nek fratino, nek frato —
 En tiu malfacila hor' de agonio — ne forprenu de mi la solan konsolon,
 ke *Ci estas!* — kaj la animojn al si vokas en hor' de la morto! —

Kiel do mi povus — ekde morgaŭ jam nenion scii pri li?
 Forgesi kiel balanciĝas lia plej dolĉa kapeto,
 kiel la okuloj — infanan aldonas raven al la belec' de l' vizaĝo? ...

— Kaj kiel poste li aĝiĝos kaj kun homaj renkontiĝos, maljustaĵoj,
 kaj kiel li siajn infanojn edukos — ĉu mi ne vidu, ho Dio?
 Kaj kiel liaj haroj blankiĝos — kaj kiajn honorojn li ĝuos:
 ĉu estos bona li kuracisto, ĉu inĝeniero, kaj eble poeto,
 el kies koro ekfluos torento de sunaj ĉarmoj?!
 Ĉu ŝtelisto li elkreskos (ho Dio, ŝirmu!) — aŭ mortiganto,
 ĉu mizerikordon li evidentigos, ĉu eble estos li sen koro?! —
 — Pri nenio ĉu mi jam sciu?!—

Mi tre ŝatus ke li sciu ludi ian instrumenton:
 violonon, aŭ violonĉelon, aŭ eble pianon —
 Mi tiel ĝojus — en la alia mondo — aŭdi tiun lian ludon,
 — adresitan: kvazaŭ letero al mi... Mi jam ekkonos la sigelojn...
 Li tiel al mi — per la tonoj — kaj al Ci, bona mia Dio,
 ĉiuvespere irus promeni — post la tumulta ĥaoso tuttaga...
 — Havu mia animo okulojn malfermitajn — kie ajn Ci ĝin loĝigos,
 ĝi vidu, ĝi vidu almenaŭ de malproksime la vizaĝon de sia filo!

Tion solan mi petas antaŭ la morto, pri tio sola mi hodiaŭ preĝas!

.
 ; * * * * *

La okuloj jam estingiĝas — Donu la buŝon! — restu ĝia dolĉeco en mia me-
[moro!

La manoj senfortiĝas — kaj mi vidas: paŝon post paŝo al mi proksimiĝas —
— Levu min nun! — mi sidiĝos je unu minuto, nur unu:

Mi ankoraŭ vin vidas kaj sentas, tuŝas kaj enspiras, mia filo! —

— Kaj jen mi iras en landon, kie — la suno — eble — ankaŭ — lumas,

kaj mi eble havos tie multe — tre multe da infanoj ...

Multe — multe kaj multe — kaj ĉiuj al mi alŝoviĝas —

.

Kiu al vi la ŝtrumpojn flikos — morgaŭ, kiam mi estos — en la ĉerko?! —

El la pola trad.

EDWARD WIESENFELD

Premiita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj



Ŝatata demono

*Kiam mi virinon trovas
nomi ŝin demon' mi povas;
ŝi, kun masko de anĝelo,
en inferon min enŝovas...
tra la pordo de l'ĉielo.*

Ĉiam batas mia koro,
kaj mi sentas min en gloro,
kaj la sang' en mi sin movas,
kaj ekkaptas min fervoro,
kiam mi virinon trovas.

Kaj mi ĉiam, sen alarmo
elforgesas, pro l'amvarmo
al virin' kiun mi trovas,
ke ja, malgraŭ ŝia ĉarmo,
nomi ŝin demon' mi povas

Mian koron ŝi venenas;
sed pro la plezur' mi svenas
kiam, kvazaŭ de l'ĉielo
falintaĵo, al mi venas
ŝi kun masko de anĝelo.

Amrigardojn, ampromesojn,
amdelogojn, amkaresojn,
ŝi rimedojn ĉiajn provas;
ŝi, ĵurante amajn jesojn
en inferon min enŝovas

Sed... ne grave! ŝin mi trovu
kaj per amplezuroj povu
plenumiĝi ŝia celo;
en inferon ŝi min ŝovu,
sed... tra l'pordo de l'ĉielo!

ARTUR DOMÉNECH MAS

XIV Kongreso de K. E. F.

Sóller 5-6-7 junio 1927

Se vi iam partoprenis niajn kongresojn kaj ĝuis la belecon de la loko, kiu kolektis la membrojn de K. E. F. okaze de nia ĉiujara festo, se vi povis konstati kiom da fervoro vekis la verko de nia majstro en ĉiu vilaĝo kaj urbo, vi ne povas forlasi la bonegan okazon, kiun prezentas nia proksima kongreso en Sóller, ne nur pro la merita tasko de la transmaraj organizantoj sed ankaŭ, kaj tio estas aparte grava, pro la belega marveturo kaj ĉarma restado en Mallorca, la vera perlo Mediteranea.

Kiom da esperantistoj ni trovus en niaj vicoj, kiuj neniam decidigis partopreni niajn Kongresojn. Al ili ni devas propagandi plej energie por la sukceso de nia XIV, por ke ĝi altiru al si grandan nombron da esperantistoj.

La Organiza Komitato, sub la lerta gvido de nia batalema samideano Arbona, komencis tre sukcese la propagandon de la kongreso kaj la organizon de loĝado kaj vojaĝo, pri kiuj ni detale informos en postaj numeroj.

Kiel honora vicprezidanto estis elektita S-ro. Johano Barceló Andreu, nia estimata kunbatalanto, kiu reprenis nian standardon post longa restado en Afriko.

XIII Internaciaj Floraj Ludoj 1926-7

LISTO DE PREMIOJ (1) (daŭrigo)

XVI. — De «Ĝirona Espero» el Girona: ptoj. 50 por temo libervola.

XVII. — De «Esperantista Nesto» el Barbarà del Vallès: ptoj. 50 por temo libervola.

XVIII. — De «Espero Katolika» el Paris: Dumviva abono por temo «Dia Amo».

XIX. — De «Urbeŝtaro de Sóller»: ptoj. 100 por temo «Plej bona traduko de unu el la versaĵoj de la Soller-a poeto Guillem Colom».

Nia konata samideano Teo Jung, atinginta la Naturan Floron de la antaŭaj F. L. oferis por nia kaso ptojn. 50, kiuj estas proponotaj al la samranga laŭreato de la proksimaj F. L. por helpi lian ĉeeston al la Solena Festo en Sóller dum la okazonta Kongreso de K. E. F. Li ankaŭ donacis luksan ekzempleron de sia premiita verko «La Alta Kanto de la Amo» kiel aldono al ĉiu premio por la Ordinaraĵoj Temoj (1).

N O T O J

Ĉiuj konkursoj bone legu kaj plenumu la kondiĉojn por akcepto de verkoj (1).

VERKOJ RICEVITAJ (ĝis la 25 nov. 1926)

1. Pax. — 2. Kiu el vi estas senpeka. — 3. Mezepokulo. — 4. Fidelitas. — 5. Semper Idem. — 6. Pasero sperta ne bezonas averton. — 7. Gedanken sind zollfrei. — 8. Poezio estas amo, amo estas poezi'. — 9. Fil' erarinta. — 10. Panem et Circensis. — 11. Ĉu la bestoj ankaŭ havas animon?

DELFI DALMAU, SEKR. Carrer València, 245 — Barcelona

(1) Vidu K. E. n.º 26-27, sept.-oktobro.

Alvoko al la tutmonda esperantistaro,

al ĉiuj asocioj, grupoj, izolaj esperantistoj,
havigi al nia movado por la «jubilea jaro
1927» nombradon de nia popolo en kom-
pleta statistiko.

Samlingvanoj, bonvolu *legi* mian artikolon *ne nur unufoje sed kelkfoje* atente kaj *kun la nepra volo helpi* laboron, kiu kontentige povas esti efektiva nur, se ĉiuj helpas, se neniu forgesos sian devon.

Ankoraŭ hodiaŭ post 4 jardekoj de nia movado neniu povas diri, kiom da esperantistoj ekzistas en la mondo. Nombrante nian popolon oni ĝis nun kutime nur «*taksis*», oni *ne fiksis* la nombron de niaj popolanoj esperantistaj sur la bazo de fidinda statistiko. Sed nur faktoj pruvas, konvinkas — ne vortoj aŭ nura takso. Pro tio fidinda statistiko estas nepre necesa por ĉiuj, tute egale, kion ili speciale celas per Esperanto. Ni ja ĉiuj senescepte celas la propagandon de la mondlingva ideo. *Ni lasu principe al ĉiuj asocioj kaj organizaĵoj plenan liberecon. Ni marŝu disigite, tamen ni batalu kunigite dum la taŭga momento.* Nun estas tia momento. La jaro 1927 estos jubilea jaro, ĉar 1887 aperis la unua broŝuro de «D-ro Esperanto». Montru, por festi la jubilean jaron antaŭ la tutmonda publiko kaj por honori la memoron de nia majstro, ke ĉi tiu malgranda broŝuro de 1887 estigis grandan, respektindan movadon.

Post kiam mi ofte estas parolinta pri la graveco kaj urĝeco de tutmonda statistiko, nun, per interkonsento de la plej gravaj Esperanto-institucioj mi estas komisiita, preni sur min la taskon, liveri ĝin. Mi estas certa, ke, se la nuna eksperimento sukcesos, nia propagando estos treege plifaciligata kaj efika, kaj ke ni poste regule povos labori sur la statistika kampo kun unuigitaj fortoj, tiamaniere havigante al ni la intereson de l' registaroj kaj seriozaj institucioj, kiuj ĉiam unue postulas fidindajn «*nombrojn*» pri la koncerna enlanda aŭ la internacia movado.

Ni iru la plej simplan kaj plej malmultekostan vojon! *Estos nur necese, ke ĉiuj Esperanto-grupoj kaj rondoj* (tute egale, ĉu ili estas organizitaj en iu ajn asocio aŭ ne!) *oferu kelkajn minutojn da laboro, krom tio du paperfoliojn kaj unu poŝtmarkon;* la samon faru la diversspecaj asocioj kaj ankaŭ la esperantistoj vivantaj izole. Pripensu mian planon kaj konsentante ĝin, agu *tuj* laŭ la plano proponita. Ĝi baziĝas sur la konvinko, ke nia Esperanto-gazetaro, kiu ĉiam estis oferema kaj helpema, helpas la efektivigon de la plano, represigante ĉi tiun mian alvokon. Ni ne bezonos la multekostan forsendon de presitaj demandoj el iu ajn centro, ni ne bezonos financan subtenon.

Mi proponas al vi, respondi al tri demandoj, unu por la ĉiuspecaj grupoj, unu por la asocioj inter-kaj sennaciaj, naciaj, fakaj, unu por la izole vivantaj esperantistoj:

I

Demandaro por grupoj
(societoj, kluboj, rondoj k. s.)

1. *lando kaj landparto?*
2. *loko? (urbo aŭ vilaĝo?)*
3. *nomo de la grupo aŭ rondo?*
4. *al kiu organizaĵo la grupo apartenas? nomu la organizaĵon!*
5. *kiom da membroj via grupo havas je la fino de l' jaro 1926?*
6. *kiom da kursoj la grupo organizis*
 - a) *dum la jaro 1926 (enkalkulite la ĝis nun nefinitajn)*
 - b) *depost la starigo de la grupo entute?*
7. *ĉu en via loko ekzistas aliaj Esperanto-grupoj? kaj kiuj? (demando nepre respondenda pro la kontrolo, ĉu la statistikestro ricevis ĉiujn sciigojn el via loko)*
8. *kiom da esperantistoj en via loko ekzistas ekstergrupaj entute! (kalkulu singardeme! nepre ne taksu tro alte! Preferu noti ciferon pli malaltan, sed tute fidindan!)*
9. *ĉu via grupo*
 - a) *havas bibliotekon?*
 - b) *kun kiom da libroj?*
10. *tre preciza adreso de via grupo?*

Subskribo de l' raportinto.

Raportante atentu jenajn punktojn:

a) Skribu tre *legeble* (ankaŭ la nomon de l' raportinto), se eble skribmaŝine. Skribu la nomojn de via urbo ktp. per *latinaj literoj* en via nacia lingvo (ne esperantigu la nomojn!).

b) *Ne ripetu la demandojn* sed nur notu la ciferojn 1—10 kaj simple donu laŭ tiuj ciferoj la koncernajn respondojn aŭ sub 5, 6, 8, 9b *nur ciferojn*. Rezignu al ĉiuj aliaj notoj kaj specialaj komunikaĵoj.

c) Uzu ĉiuj — por ke la materialo povu esti bone ordigata — *la saman formaton* de l' papero (la kutiman formaton de negocaj leteroj:) laŭlonge 28,5 cm (aŭ 11 in.), laŭlarĝe 22,5 cm (aŭ 9 in.).

d) Donu la respondojn *en du ekzempleroj* sur du paperoj, por ke la koncerna materialo post la fino de l' statistika laboro povu esti sendata al la koncerna asocio, al kiu apartenas la grupo.

e). Sendu vian raporton en *fermita* letero, sufiĉe *afrankite*, al la adreso:

D-ro Ditterle

Fakestro por Statistiko de I. C. K.

Leipzig W 31

Seumestrasse 10

Do, taŭge kaj ĝuste farita raporto aspektos jenmaniere:

1. *Deutschland (Germanujo) — Sachsen (Sakstujo)*
2. *Neustadt (urbo)*
3. *Verda Stelo*
4. *Germana Esperanto-Asocio*
4. *54*
6. a) *3*
b) *27*
7. *jes: Laborista Grupo kaj grupo de Esperantistaj Instruistoj*
8. *48*
9. a) *jes*
b) *118*
10. *Esperanta-Grupo «Verda Stelo» en Neustadt, p. a. Prez. S-ro A. Müller, Langestrasse 17, III.*

Kiel sekretario de la grupo:

H. Schulze, Arnsdof apud Neustadt

Hauptstrasse 9.

Oni ja povus proponi, ke la diversaj asocioj kolektu la respondojn de siaj grupoj kaj sendu ilin samtempe. Sed tiam *ne estus eble* por mi, *prilabori la materialon*, ĉar mi ricevus tro multajn raportojn dum unu tago kaj verŝajne nur en la lasta minuto. Mi ne havas helpantojn ekster la Instituto, cetere mi havas mian regulan ĉiutagan laboron, neprokrasteblan. Se mi ricevos ĉiutage kelkajn respondojn de unuopaj grupoj kaj se mi ricevos la materialon baldaŭ, tiam mi havos la okazon, tute trankvile laŭ bona plano ordigi ĉion helpe de listoj kaj kartotekoj.

II.

Krom la raportoj de la unuopaj grupoj ni bezonas specialajn respondojn de la diversaj asocioj inter-kaj sennaciaj, naciaj, fakaj laŭ jena skemo:

Demandaro por asocioj (federacioj k. s.)

1. *nomo de la asocio?*
2. *celo de la asocio?*
3. *nombro de la grupoj, kiuj apartenas al la asocio?*
4. *Kiom da personoj ampleksas ĉiuj asociaj grupoj entute? (inkluzive la izole aliĝintaj)*
5. *ĉu via asocio eldonas oficialan gazeton? kiun?*

6. ĉu via asocio eldonas oficialan lernolibron? kiun?
7. preciza adreso de via asocio?

Nur por naciaj asocioj:

8. kiom da lernolibroj aperis en via nacia lingvo?
9. kiom da lernolibroj (laŭ kalkulo de l' eldonistoj) estas venditaj ĝis hodiaŭ?
10. kiuj Esperanto-gazetoj aperas en via lando?

La ciferoj de la asocioj estos aliaj ol la sumigitaj ciferoj de la asociaj grupoj, ĉar la asocio nur povas respondi laŭ la stato de 1925; la grupoj raportos laŭ la stato de 1926. Tamen tiu vojo estas rekomendinda, ĉar oni povas kontroli la kreskon aŭ malkreskon de la asocio. Cetere la respondojn pri 4, 5, 6, 8, 9, 10 plej bone donos la asocioj.

III.

Demandaro por izole vivantaj esperantistoj kaj lokoj, en kiuj ne ekzistas grupoj:

1. lando?
2. loko?
3. nombro de la esperantistoj? (ankaŭ se ekzistas nur unu, li nepre respondu!)
4. ĉu en via lando en aliaj lokoj ekzistas esperantistoj? kaj kie?

Subskribo kun adreso.

Kial ni kalkulu la izole vivantajn esperantistojn? Ne nur, ĉar ili estas tre gravaj personoj por la disvastigo de nia movado, sed ankaŭ, ĉar estas tre grava afero, konstati, en kiom da lokoj en la mondo ekzistas anoj de nia movado.

* * *

Samlingvanoj! Bonvolu ne kritiki la proponitajn demandojn. Oni povas proponi demandojn laŭ cent diversaj aliaj manieroj. Mi longtempe pripensis la aferon kaj serĉis la plej simplan vojon. Poste, se ni estos sukcesintaj per la «*unua eksperimento*», ni espereble povos daŭrigi niajn enketojn, ankaŭ por specialaj aferoj (lernejoj, komerco, scienco ktp.). *Sed unue ni faru la unuan paŝon.*

La demandoj de la proponitaj demandaroj estas malmultaj, sed laŭ mia sperto nur ili estas iomete fidinde respondeblaj de ĉiuj. Per la unua eksperimento mi celas: simpligi la tutan aferon, por atingi minimume ion; pro la simpleco de la laboro allogi al respondo kiel eble plej multajn — aŭ pli bone ĉiujn; malmultekostigi la tutan entreprenon, ĉar elspezoj por niaj gazetoj ne estos. Cetere — mi ripetu tion! — ĉiu respondanto devos elspezi nur la kostojn por du paperfolioj kaj unu poŝtmarko.

Malgraŭ tio ni atingos iomete kontentigan rezultaton; ĉar laŭ la materialo — espereble! — ricevota oni povas konstati:

en kiom da landoj ekzistas esperantistoj kaj en kiuj?
 en kiom da lokoj ekzistas esperantistoj kaj en kiuj?
 kiom da grupoj ekzistas entute? kaj kie en la mondo?
 kiom da grupoj ekzistas en la diversaj landoj?
 kiom da esperantistoj ekzistas entute?
 kiom en la diversaj landoj?
 kiom da esperantistaj organizaĵoj ekzistas?
 kiom da esperantistoj apartenas al organizaĵoj?
 kiom da Esperanto-kursoj okazis dum la jaro 1926?
 kaj kiom dum la pasinta tempo entute?
 kiom da grupoj havas bibliotekojn?
 kiom da libroj estas en tiuj bibliotekoj?
 kiom da gazetoj ekzistas? kaj kiuj?
 kiom da diversnaciaj lernolibroj ekzistas?
 kiom estas venditaj? k. a. k. a.

Ĉiuj grupoj, asocioj, izolaj esperantistoj **tuj, post kiam ili sciigis per ĉi tiu artikolo pri la tutmonda statistiko, klopodu forsendi la respondojn** kiel eble plej baldaŭ. Ju pli baldaŭ la ordiga laboro povas esti komencata, des pli granda estas la garantio, ke la resuma statistika raporto povas aperi ĝustatempe. El malproksimaj, transoceanaj landoj la respondoj ja venos nur post kelkaj monatoj. La esperantistoj en Eŭropo ne rigardu tiun fakton kiel pretekston por prokrasti sian respondon. Alie ni ne atingos nian celon por 1927.

Rememoru ankaŭ tion, ke ekzistas samlingvanoj kaj tutaj grupoj, kiuj bedaŭrinde ne legas Esperanto-gazetojn. Konante tiajn, *atentigu ilin* pri la statistiko kaj ilia devo. Kie grupestro ne estas sufiĉe laborema, la grupanoj *mem* kontrolu, ĉu li forsendis sian raporton kaj insiste postulu tion.

* * *

Ĉi tiun mian artikolon ne sekvos aliaj; ĝi estas la unua kaj lasta **alvoko**. Mi persone ne povas garantii kontentigan rezultaton, tion povas fari nur vi ĉiuj, helpante senescepte. Mi promesas al la esperantistaro precizan kaj akuratan laboron, sed promesante tion, *mi samtempe rezervas al mi la rajton, rezigni al la statistika laboro, se la esperantistaro ne sufiĉe subtenos la laboron. Do, subtenu ĝin!* Malpravigu la «pesimistojn», kiuj asertas, ke la tutmonda esperantistaro ne kapablos doni kompletan statistikon! Helpu tuj, senprokraste! Helpu laŭ preciza maniero, fidinde! Helpu, por doni al nia movado impresigan propagandilon, kaj por honori la memoron de D-ro Zamenhof! Per nenio alia li estos honorata tiel, kiel per la pruvo antaŭ la mondo, ke lia afero dum kvardek jaroj marŝis senhalte.

Prof. D-ro *Dietterle*

Fakestro por statistiko
 de Internacia Centra Komitato
 Direktoro de la Esperanto-Instituto
 por la Germana Respubliko

Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

Karl Marx. Lia Vivo kaj lia Verko. — Kompil-esperantigis V. Elsudo. Biblioteko de Sennaciulo. Serio soci-politika. Havebla ĉe S. A. T., Colms-trasse 1, Leipzig-O 27. 1926. 96 pĝ. 11 × 14. Prezo: 0. 60 gm.

Enhavo: La Vivo de Karl Marx laŭ N. Lenin kaj Fr. Engels; Deveno kaj Esenco de Marksismo laŭ R. Luxembourg; Marksismo kaj Scienco laŭ Prof. S. Semkovski.

Karl Marx estas nomo tiel disvastigita tra la tuta mondo, ke la nova volumo nenion novan povos prezenti al tiuj, kiuj de iom proksime studis la laboristan movadon, sed oni renkontas tiel malofte vere instruitajn laboristojn, vere konsciajn proletariojn, ke la malmultaj paĝoj povos multon fari por la celo, kiu gvidas la eldonintojn.

Bona preso kaj ĝenerale bona lingvo. — SALJO.

Ŝtato kaj Revolucio de N. Lenin. — El la rusa lingvo tradukis G. Demidjuk. Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, Colmstr. 1, Leipzig O-27. 1926, 150 pĝ. 18×12. Prezo: 1 gm.

Subtitolo «Marksisma instruo pri la ŝtato kaj taskoj de 1' proletaro en revolucio» donas ideon pri la verko de Lenin, la homo kiu en la lasta tempo altiris la atenton de la tuta homaro kaj la timigitan rigardon de multaj ŝtatistoj, kiuj vidis en danĝero sian profitdonan negocon.

El la diversaj rusaj revoluciuloj, Lenin reliefigis kiel pli bona idealisto ol la ceteraj. Pro tio lia verko vekos intereson ĉe ĉiu rondo de laboristoj, laborantaj por sia libero.

La paragrafojn de la verko oni legas kun intereso. La doktrino de Marx ludas ĉefan rolon, kaj la aŭtoro trafe disvolvas la ideojn por instrui la laboristojn por la definitiva batalo.

Superflue estas diri ke la libro, korekte tradukita kaj presita, meritas akcepton plej koran ĉe ĉiu rondo de progresemluloj. — SALJO.

La Prepozicioj kaj la Akuzativo en Esperanto. — Verkis Alberto Mair. Havebla ĉe la aŭtoro, Hasnerstrasse 103, Wien XVI. 72 pĝ. 16×11. Prezo: 1 sv. fr.

Ofte ni rimarkas, ke esperantistoj, sufiĉe progresintaj en la lernado de Esperanto renkontigas kun malfacilaĵoj por trafi ĝustan prepozicion. Ĉe bonaj esperantistoj ni vidas kelkafoje eraran uzon de prepozicio. Al la helpo de tiuj samideanoj venas ja bonega verko de Mair, kiu kun granda zorgo ellaboris libron tre utilan.

Ĉiu prepozicio haŭas kompletan klarigon kun multaj ekzemploj kaj necesaj komparoj, plej ofte trafaj kaj ĝustaj. Iafoje, eble, ni ne dividus la opinion de la verkinto sed tio ne forprenas nian laŭdon al la verko, kiu estas taŭga amiko de ĉiu progresinta esperantisto. — SALJO.

Kio estas Oomoto. — Esperantigis T. Juri. Eldonis Oomoto Propaganda Oficejo, Tenseiŝa, Kameoka Kioto-fu, Japanujo. 1926. 55 pĝ. 18¹/₂×13. Prezo: 0. 60 sv. fr.

La nova spirita movado estas tiel fervore disvastigata de ĝiaj partianoj, ke ĉiu esperantisto havas pri ĝi pli-malpli ĝustan ideon, sed se oni volas profunde konatiĝi kun tiu movado nepre oni devas legi tiun ĉi zorge tradukitan broŝureton. — SALJO.

Skotlanda Pejzaĝo. — Eldonis Higgie kaj K-io, Rotheray, Skotlando. Prezo: 1 ŝilingo.

Kun aldono «Belega Skotlando», la albumo prezentas multajn ilustraĵojn de skotaj pejzaĝoj kun diversaj informoj pri la lando. Bedaŭrinde la teksto ne estas sufiĉe korekta, kio estas makulo apud la belaj bildoj, trafe respuglantaj la belecon de Skotlando. — SALJO.

Unuiĝo de Ligilo U. S. S. R. — El la rusa tradukis Viktor Ĵavoronkov. Eldonis Centra Oficejo de Esperantistoj de Ligilo de U. S. S. R. 54 rue Cistine, Paris-18. 1926. 39 pĝ. 23×15. Prezo: 1/6 de dolaro.

La eldoninto sin turnas al la leganto jene: Inter laborantoj de Ligilo (Poŝto, Telegrafo, Telefono kaj Radio) de tuta mondo, internacia lingvo Esperanto, ĉiam pli kaj pli, komencas varbi siajn adeptojn, praktikulojn kaj aprobantojn aplikantaj por la servo de interligilo, tiun ĉi mirinde simplan kaj facilan helpingvon en internaciaj interrilatoj. Vere oni konstatas aktivkreskadon de esperantistoj inter P. T. T. R. — istoj de ĉiuj landoj, kaj dezirante helpi al tiu ĉi kreskado, Centra Oficejo de Esperantistoj de Ligilo U. S. S. R. decidis eldoni, en la esperanta traduko prezentata al la legantaro, ĉi sube skizon, por tiamaniere liveri al samideanaj-kolegoj, la materialon por la retradukoj en naciajn lingvojn kaj per tio kanatigi kun la kondiĉoj de laboro en Unuiĝo de Ligilo en U. S. S. R.

La broŝuro estas tre interesa, precipe por fakuloj. Pri la traduko ni povas diri nur laŭdon. — SALJO.

Baha' u' llah kaj Lia Misio. — De Dro. John Esslemont. El la angla originalo tradukita. Publikaĵoj de la Esperanto-komitato de la Bahaa-movado Hamburg. 1926. 26¹/₂×16. Prezo: ne montrita.

«La Bahaa-movado estas ŝarĝita per misio de Sciigoj Ĝojigaj por la homoj — la misio, ke ree granda profeto aperis, kiu parolas en la nomo de la Sinjoro kiel la profetoj de pasintaj tempoj kaj alportas la nepageblan benon de Dia Gvidado al la konfuzita kaj erarigita homaro.»

La celo de la broŝuro estas doni mallongan resumon pri la vivo de profeto, kiu nomiĝis Baha' u' llah, kiel ankaŭ pri lia antaŭirinto El Bab. Ĝi donas ankaŭ skizon pri la ĉefaj trajtoj de liaj instruoj kaj malgrandan studon pri la rilatoj al Kristanismo kaj la ceteraj religiaj sistemoj de la mondo. — SALJO.

Common Commercial Terms in English & Esperato, faka vortaro angla-

esperanta pri komerco, lerte preparita kaj eldonita de «The Esperanto Institute Limited», Welwyn Garden City, Herts (Anglujo). Prezo: 6 pencoj.

Estas tre bone, ke la angloj, kies lingvo estas unu el la plej disvastigitaj en la tutmonda komerco, pretigis tiun fakan vortaron, kiu efektive venas riĉigi la provizon de esperantaj terminoj. Ĉu la samideanoj el aliaj nacioj ne povus siavice prepari similajn vortaretojn pri filozofio, naturscienco, arto, k. t. p.?—J. G. C.

La Alta Kanto de la Amo, de Teo Jung, «Heroldo de Esperanto», Horrem bei Köln (Germanujo). Prezo: 0'75 Rm.

Belega broŝuro 40-paĝa, enhavanta la poemon de la konata Redaktoro de «Heroldo de Esperanto», S-ro Teo Jung, kiu nunjare meritis la Naturan Floron ĉe niaj Floraj Ludoj.

Ĉar «La Alta Kanto de la Amo» jam estas presita sur la paĝoj de «Kataluna Esperantisto», nenecese estas raporti al niaj legantaj pri la belaj de tiu poemo, originala rekantaĵo de malnova legendo. Certe, pro la temo de ĝi pritraktata, ĝi estis speciale taŭga por ricevi tiun plej altan premion en nia literatura festo.—J. G. C.

Palaco de Danĝero, verkita en angla lingvo de Mabel Wagnalls, kaj tradukita de Edward S. Payson, Honora Prezidanto de la Esperanto Asocio de Nordameriko. Eldonis: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig (1926). 19 × 13. Prezo: 6 Rm.

Libro 208-paĝa, unu el la plej arte kaj lukse prezentitaj en Esperanto, gracia rakonto pri scenoj de la franca kortego, en la XVIII^a. jarcento, kies heroino estas Madame Pompadour, amantino de la reĝo Ludoviko XV^a. Ĝia legado estas interesa kaj alloga, kaj la stilo sufiĉe korekta. En tiu novelo, verkita de angla aŭtoro pri la franca vivo, estas multaj francaj nomoj, kiujn la tradukinto konservis en franca lingvo. En kelkaj okazoj, ni komprenas la ĉarmon de tio, sed ĝenerale ni estus preferintaj la esperantigon de propraj nomoj. Kvankam, kiel estas dirite, la stilo estas kontentiga kaj ofte tute flua, ni trovis kelkajn makuletojn. Ekzemple: «Foje en seĝo» anstataŭ «jam en seĝo»; «Vizaĝesprimoj», super kiu eble estas preferinda «mienoj»; «eĉ nek» anstataŭ simple «eĉ ne» aŭ «nek», kaj aliaj.

Entute la libro estas bona kaj meritas la plej bonan akcepton, ĉe la esperantistaro, kiu devas danki la laboremecon de S-ro Payson, lerta tradukinto de «La Akrobato de Nia Sinjorino» kaj «Blanche, la Virgulino de Lille» Ŝajne la Honora Prezidanto de la Nordamerika Asocio aparte ŝatas verkojn pri francaj temoj, kiuj speciale estas interesaj kaj «proksimaj» por katalunaj legantoj.

La Esperanto-eldonejo «Ferdinand Hirt & Sohn», de Leipzig, meritas per «Palaco de Danĝero» novan aplaudon kaj efektivan kunhelpon.—J. G. C.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Pro... kaj Por...

La Interligilo de l' P.T.T. — Jam de kvin jaroj la nomita Interligilo baltas por disvolviĝi sian fakan movadon, kiu bezonas vastan diskonigon. Ja estas poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj, radio-profesiuloj en la tuta mondo, sufiĉe multaj el ili estas ĉu esperantistoj, ĉu esperantemaj, sed ĉar faka propagando disvolviĝas malfacile, eble ili ne informiĝis ankoraŭ pri la stariĝo de Interligilo kaj ili ne aliĝis al ĝi por puŝi antaŭen la subtenindan movadon.

La redakcio de Interligilo de l' P.T.T. alvokas ĉiujn fakulojn al komuna agado. Turnu vin al 54, rue Custine, Paris-18.

Nia movado en Palma. — En la laborista societo C.R. del T. de nia najbara insulo Mallorca oni malfermis kurson de Esperanto sub la gvido de nia amiko kaj samideano Joan Matas. La kurso estas tre sukcesa.

XIX Universala Kongreso de Esperanto, Danzig. — Oficiala informilo. — Dato: La XIX. Universala Kongreso de Esperanto en Danzig okazos 28 Julio ĝis 4 Aŭgusto 1927. — Patrono de la kongreso: S-ro D-ro Heinrich Sahn, Prezidanto de l' Senato de la libera urbo Danzig. — Loka Kongresa Komitato: Honora prezidantino: S-ino Anna Tuschinski. Prezidanto: S-ro Bernhard Aeltermann, Del. de UEA. Vicprezidanto: S-ro Kazimierz Majoriewicz. Financoj: S-ro Kurt Sachaze. Sekretarioj: F-ino Käthe Marquardt kaj F-ino Schulz. Gazetaro: S-ro Edmund Fethke kaj S-ro Ernst Grabowski. — Alvojaĝo: Por la envojaĝo, al Danzig trans Stettin—Stolp aŭ Schneidemühl—Dirschau (Tzew), aŭ Königsberg—Marienburg—Dirschau (Tzew) estas necesa eksterlanda pasporto kun pola transitvizo. — Pola vizo ne estas bezonata, se la envojaĝo okazos jenmaniere: 1. per ŝipo de Swinemünde, Pillau, Stockholm, Riga ktp, al Zoppot, de tie per fervojo al Danzig, 2. per fermita koridor-vagonaro de Berlino al Marienburg, de tie per malgrandfervojo, aŭto aŭ aeroplano al Danzig, 3. per aeroplano de Stockholm. Stettin, Berlin, Königsberg. — *Danziga vizo ne estas necesa.* — Uzu la aranĝotajn karavanojn de UEA pri kiuj detaloj sekvas en Januaro. — Kotizo: Por ĉiuj kongresanoj sen diferenco laŭ landoj. 25 danzigaj guldenoj aŭ 20 germanaj markoj aŭ 1 angla funto aŭ 25 svisaj frankoj. Por blinduloj senpage.

«*Esperanto press*» en Warszawa. — Ĵus fondiĝis en Warszawa presa esp. agentejo, nomita «Esperanto Press», kies direktoro estas Stanislaŭo Essigman, delegito de U.E.A. kaj prof. Leopold Kronenberg. Celo de la agentejo estas provizi ĉiujn redakciojn esperantajn kaj naciajn per artikoloj, spegulantaj vivon politikan, socian kaj kulturan en Polujo. Tiucele dissendas esperanto-press siajn artikolojn laŭ ĉiuj konataj adresoj de delegitoj de U. E.A., esperantaj kaj naciaj gazetoj kaj al esperantaj ĵurnalistoj. Ĵus oni dissendis unuan «leteron el Polujo» kaj artikolon pri fama muzikisto Frideriko Chopin, verkitan de S-ino. Tekla Essigman. Ĉiu samideano, kiu ricevis ar-

tikolojn de Esperanto Press, estas petata traduki ilin nacilingven kaj presigi en sia nacia gazeto, pruvante tiamaniere gravan rolon, kiun povas ludi Esperanto en internacia ĵurnalista vivo. «*Esperanto-Press*», kies financa bazo estas plencertigita, dissendas siajn artikolojn senpage, ĝi postulas nur, ke oni sendu al ĝi 2 numerojn de ĉiu gazeto, kiu presigis ĝiajn artikolojn.

Krom tio povas Esperanto-Press liveri al ĉiuj ĵurnalistoj fotojn el Polujo (personoj, urboj, montaro, vidindaĵoj) por presigi en gazetaro.

Kunlaborantoj pagataj eventuale per la redakcioj naciaj, uzantaj artikolojn de Esperanto-Press, ĉie serĉataj. Adreso: «*Esperanto-Press*» Warszawa, Strato Piekna 11a prof. Kronenberg, Polujo.

Por bono de nia ideo helpu »*Esperanto-Press*»-on.

Malfermo de kursoj. — Kun la alveno de aŭtuno nia movado ricevas ĉiujare plivigliĝon ĉe niaj grupoj, kiuj duobligas sian entuziasmon kaj agado por altiri novajn adeptojn al nia movado.

Ĝis nun ni ricevis informojn pri malfermo de kursoj en Sabadell, Terrassa kaj Barcelona, kies lokaj grupoj organizis diversajn propagandajn kunvenojn kaj prelegojn. Ni esperas, ke la nova semado liveros al nia afero kontentigan rikolton.

Kataluna Antologio. — La Eldona Komitato de «*Kataluna Antologio*» ĵus publikigis en 20-paĝa kajero la recenzojn de la ĉefaj esperantaj revuoj kaj la opiniojn de eminentaj esperantistoj pri la grava verko «*Kataluna Antologio*».

Tiuj recenzoj kaj opinioj dece ordigitaj, donas ĝustan bildon pri la intereso kaj valoro de la literaturaj trezoroj enhavataj en tiu dika volumo.

Tiu kajero estas senpage sendata al ĉiu interesato; oni petu ĝin de S-ro. Eduard Capdevila, Carders 29, Barcelona.

Radio Barcelona. — Provizore ne plu okazos la esperanto-programo. Ĝustatempe ni informos niajn legantojn pri la reorganizo de niaj radio-paŝroladoj.

Oni laŭdas. — Pro la verkoj «*La literaturo kaj lingvo de Irlando*» kaj «*La interna ideo de Esperanto*» aperintaj en niaj lastaj numeroj, ni ricevis tre korajn laŭdojn de kelkaj amikoj kaj legantoj. Ni transdonas la laŭdojn al la verkintoj S-ino Osmond kaj D-ro Olšvanger, kiuj havigis al nia gazeto tiel interesajn artikolojn, danke al la ĉiam pli gravaj Internaciaj Floraj Ludoj.

En la verko de S-ino Osmond enŝoviĝis la jenaj eraroj:

paĝo 415, linio 25. legu Erigena anst. Erignena.

» 416, » 19. » D - Daír » Daiz

» 416, » 21. » C - Coll » Cole

» 417, » 11. » A Šeán » Šeáv

» 417, » 24. » an cnám » cuám

» 417, » 38. » An dtuigeann tú anst. dtiguim

» 417, » 39. » Tuigim. Ni tuigim anst. tiguim. Ni tiguim.

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto», València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:

Ĉiusemajna
Aktuala Ilustrita
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a

BARCELONA

“Kataluna Esperantisto”

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-Barcelona

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoncon, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston publikigotan.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per 'al

femeni

heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació
substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

terminació
adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb
(infinitiu)

kompreni
labori
komerchi
(comerciar)

E

terminació
adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condi-
cional

U

mode impera-
tiu o subjun-
ctiu

Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escrie	escrivi	escriuré	escriuria	escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.